

Radio Ĉerizo 3

2011-01-22

Radio Ĉerizo raportas hodiaŭ pri lingvoj japana kaj korea.

Japanio kaj Koreio situas ĉe la oriento de eŭro-azia kontinento; Koreio estas la lando de duoninsulo, kaj Japanio – la lando de insularo el kvar grandaj insuloj. Landolimo estas sur maro, kaj oni povas vidi pejzaĝon reciproke en bona vetero.

Du landoj kontinue havis kulturen kontakton kaj homan rilaton. Iuj konsideras, ke oni povis interparoli unu la alian sen interpretado aŭ traduko, sed tio ŝajnas fantasma aŭ fantazio.

En antikva duoninsulo ekzistis tri dinastioj, nome Ŝilao, Pekĉeo, kaj Kogurio. Lingvisto Li Kimun skribis en sia verko "Historio de la Korea Lingvo", ke pecoj de Koguria lingvo estas la plej simila al la antikva japana, kaj due, de Pekĉe-a, kaj fine de Sila-a.

Historiisto Jasumoto hipotezis, se tiuj du lingvoj estus unu antaŭ longe, kaj poste ĝi dividiĝus. Li donis al komputilo grandan kvanton de vortoj, kaj konkludis ke la disiĝpunkto estus antaŭ 9000 (naŭmil) jaroj; tio signifas, ke ili estas la tute fremdaj lingvoj.

Tamen, laŭ impresoj eklerninte reciproke lingvon, oni tuj miras la similecon kaj lernofacilecon. Kial? Estas kelkaj punktoj.

Punkto unu: vorto-ordo kaj gramatiko

Vorto-ordo estas tute sama; subjekto - objekto - verbo aŭ adjektivo. Por doni gramatikan efikon, finaĵoj estas algluitaj al ĉiuj vortoj. En Esperanto ekzistas unu sola kazo akuzativo, ĉu ne? Nominativo neniel havas markon per si mem.

Jen kelkaj ekzemploj, laŭ ordo esperanta - korea - japana.

nominativo "esperanto" -
"esuperanto ga" - "esuperanto ga".

akuzativo "esperanton" -
"esuperanto rul" - "esperanto o".

genitivo "de esperanto" -
"esperanto ŭi" - "esperanto no".

dativo "al esperanto" -
"esperanto e" - "esperanto e".

Jam sufiĉe, ĉu?

Punkto du: multaj vortoj devenintaj de Ĉinio

Du landoj importis multajn literojn de antikve prosperinta Ĉinio, la centro de orientoj kulturoj. Ĉiuj literoj havis signifojn. Tio estas nomata "ideogramo". Pro tio multaj vortoj estas uzataj komune, krom ioman malsamecon sur prononco. Tre samaj ekzemploj laŭ ordo korea - japana.

civitano - "ŝimin" - "ŝimin"
kalkuro - "keesan" - "keesan"
preparo - "ĉunbi" - "ĝumbi"
superŝoseo - "koosok toro" -
"koosoku dooro"

Problemo estas tuta malsimileco de fundamentaj vortoj, kiel

vizaĉo, nazo, orelo, mano, monto,
maro, rivero, kaj tiel plu.

Nu, ĉu vi ne volas plu scii kaj
lerni tiujn lingvojn? Bonan kuraĝon!
Okaziĝas komuna kongreso korea-
japana en ĉi-jara oktobro, la 7-an, en
Seulo, Koreio. Tiam ni salutu per
"Annjon hasejo", kaj "Konniĉiŭa".

Dume, por danko, sinjoro Saliĥ
Zakirov donis al ni e-leteron, kaj
sciigis, ke ankaŭ li komencis pod-
kasti "Voĉon el Japanio". Ni reko-
mendas al vi aboni ĉi tiun. Abonu ĉe
<http://vej.posterous.com/rss>. "vej"
estas vo, e, jo, kaj "posterous" estas
po, o, so, to, e, ro, o, u, so.

Radio Ĉerizo finas ĉi-fojan el-
sendon en Esperanto. Ĉu vi ŝatas
nian programeron? Ni atendas vian
impreson kaj kuraĝigon per e-letero.
Ankaŭ voĉa letero estas bonveniga.
Retadreso estas

radiocxerizo@gmail.com.

Radioĉerizo estu unuvorte, kaj "ĉe"
en "ĉerizo" estu c, ikso, e.

Radio Ĉerizo dankas pro viaj
multaj aŭskultoj, kaj esperas daŭr-
igan aŭskultadon. Nun ĝis reaŭdo.
De la suda Japanio parolis Bel-
monto.

mislego:

legis	devas esti
povas	→ povis
tute	→ tuta